

EL POPOLA ĈINIO

中國新運

12

1999

ISSN 0032 - 4361





Vintra rivereto

de MARIA T.C. RÿPERT (Nederlando)

En la tempo, kiam baldaŭ finiĝos la jaro 1999, ni retrorigardis nian laboron kaj rememoris la rimarkigojn kaj proponojn de niaj legantoj. Same kiel antaŭe, ĉu en la kunsido de EPC-legantoj en la 84-a UK, ĉu en la enketiloj resenditaj al ni, ĉu en la kontakto kun niaj redaktoroj, niaj legantoj montris grandan prizorgon al nia revuo, kio manifestiĝis en laŭdoj kaj kritikoj al nia revuo. Ni opinias, ke tio montras la fervoran prizorgon de niaj legantoj al nia komuna E-movado kaj ankaŭ kuraĝigon al nia laboro. Itala leganto Conti Giovanni diris, ke la revuo estas la plej bona vizitkarto por montri al la tuta mondo la praktikan konkretigon de la uzado de Esperanto. Brazila leganto Alice Amalia Klein diris, ke la revuo multe konigas Ĉinion. Ni opinias, ke tio estas la komuna penso de multaj aliaj legantoj. Kiel antaŭe, ni penis disvastigi Esperanton kaj en tio ni sentas ĝojon, tamen ni konscias, ke nia rolo estas limigita kaj ni devas labori pli diligente.

Multaj el niaj legantoj prezentis proponojn pri novaj temoj, tre valorajn por ni. La proponoj certe riĉigos nian programon. Ili ja estas ĉioampleksaj, inkl. de tradicia kulturo, pejzaĝoj, historio, geografio, ekonomia konstruado, popola vivo, sanprotektado k.a. Iuj temoj bezonas longan pritraktadon kaj aliaj nur kelkajn frazojn. Eble iuj el niaj legantoj jam rimarkis, ke iliaj proponoj estis jam akceptitaj. Koncernaj artikoloj aperis sub la rubriko "Temo Proponita de Legantoj" kaj ankaŭ multaj aliaj raportoj kun bildoj, sed eĉ tiel ni devas diri kun bedaŭro, ke pro limigo de paĝoj ni ne povis kontentigi la bezonon de niaj legantoj, tamen ni certe laboros pli energie por kiel eble plej bone kontentigi ilin.

La Red.

El Popola Ĉinio

12 [495] 1999



La Nacia Tago en nokto
Foto de Liu Sigong

Nokte de la 1-a de oktobro Tian'anmen-placo estis hele lumigita de dekmil lanternoj. Super ĝi ĉarmis artfajraĵoj de cent specoj kaj sur ĝi gaje kantis kaj dancis centmil personoj por la 50-jara jubileo de la Ĉina Popola Respubliko.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu
Adreso: P.O. Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

ENHAVO

- | | | | |
|----|---|----|---|
| 2 | INTER NI | 28 | Baofeng-lago |
| 4 | EKONOMIE:
Nova aĉeta metodo de registaro; Laŭmendila produktado; Kurantaj aferoj | 29 | HOMARO KAJ NATURO:
Prikanti la Flavan Riveron |
| 6 | Termobalono en Ĉinio | 34 | La universala poŝtaŭto |
| 8 | Neforgesebla gastado en Pollando | 37 | ESP-NOVAĴOJ |
| 10 | ĈINAJ E-ISTOJ:
Senŝanceliĝaj esperantistoj | 38 | Ili plektas amikan ligilon el voĉo |
| 12 | Azia kongreso ĉe la sojlo de nova jarcento | 40 | JUNULARO:
Trans la maro |
| 15 | POR KOMENCANTOJ:
Valoro de la vivo | 42 | Blankvanga gibono arte reproduktita |
| 15 | KORESPONDI DEZIRAS | 44 | MULTNACIA ĈINIO:
Vivmaniero de ŝuj-oj |
| 16 | SUR NIA LIBROBRETO:
"La Familio" de Bakin | 46 | EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 17 | En Makao | 48 | Kunlernado de studentoj de Pekino kaj Hongkong |
| 20 | Grandioza festado:
Pompa ceremonio; Gaja vespero; Mi spertis festadon kaj ŝanĝiĝon en Pekino | 51 | ĈINAJ METIARTAĴOJ:
Ora globuso perlo-inkrustita |
| | | 2 | FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Vintra rivereto |
| | | | SUR LA DORSKOVRILO:
En neĝo |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|-------------------------|------------------------|
| 1. Huangshi (p. 10) | 4. Hainan-prov. (p. 6) |
| 2. Hukou (p.29) | 5. Makao (p. 17) |
| 3. Guizhou-prov. (p.44) | |

Nova aĉeta metodo de registaro

de JI PING

ĈINOJ ŝerce diras, ke la administra sistemo de la financa elspezo de la registaro similas al aĉeto de legomoj far kuiristoj. La financa departemento donas monon al ĉiuj budĝetaj unuoj, por ke ĉi tiuj mem aĉetu la bezonaĵojn.

Tio facile kondukas al koruptiĝo, ĉar la aĉetantoj rajtas elekti la varojn laŭ sia plaĉo kaj povas akiri komisipagon. Tio estas jam publika sekreto. Aĉetado por registara institucio estas eniata en ĉiuj unuoj. En la aĉetado multaj preferas la varojn kun internacie fama marko al la naciaj. Kaj krome, la supre dirita metodo facile kaŭzas blindan kaj ripetadan aĉetadon kaj maljustan komercadon, kio multe ŝarĝas la ŝtatan financon. En la lastaj jaroj en iuj urboj la lokaj registaroj ŝanĝis la metodon kaj la afero ekŝanĝiĝis.

Tio ja estas publika aĉetado. Por sia ĉiutaga laboro kaj publikaj instalaĵoj, kiaj ŝoseo, fervojo, ponto, akvo- kaj elektro-provizo, la registaroj de diversaj niveloj per adjudiko aĉetas la bezonatajn varojn, adjudikas konstruon kaj servadon. Laŭ la vaste aplikata metodo, la registaro racie kombinas la merkatan konkurencon kun gvido de la financa elspezo, kies ĉefa trajto estas publike adjudiki liveron de ia ajn objekto, tiel ke la registaro aĉetas kontrolate de la socio, ĵurnalismo kaj leĝoj surbaze de la principo publika, justa kaj racia. En la estonteco Ĉinio pli grandigos la sferon de la aĉetado kaj adjudikos ankaŭ la vaste uzatan instalon, fundamentan konstruon, riparon de aŭtoj kaj servon en kunvenejoj.

Tia aĉeta metodo estis aplikata jam plurajn jarojn internacie. Ĝi estas bonvena ankaŭ en Ĉinio. Februare ĉi-jare en la Speciala

Ekonomia Distrikto Shenzhen oni faris publikan adjudikon pri urba verdigo kaj dank' al tio la registaro ŝparis 1.55 milionojn da juanoj. La administracioj de la registaro de Hebei-provinco ŝparis 20 milionojn da juanoj en aĉeto kaj riparo de aŭtoj, asekuro, aĉeto de oleo kaj okazigo de kunvenoj...

Enkonduko de la sistemo de publika aĉetado en Ĉinio estas ne nur bezono por nuligi la neraciajn metodojn en la antaŭa aĉetado, sed ankaŭ necesa kondiĉo por aliĝi al duflankaj kaj plurflankaj internaciaj ekonomiaj organizoj. Nun tiu metodo en Ĉinio estas ankoraŭ en provado, tamen ni povas diri, ke tio estas jam neŝanĝebla.

Internacie la fakuloj opinias, ke dank' al praktikado de la supre menciita metodo oni povas ŝpari 10% de la budĝeta monsumo, laŭ tiu procento la ĉina registaro povas ŝpari ĉiujare 80 miliardojn da juanoj en sia administra elspezo. ■

Laŭmendila produktado

de LU WEN

PLANI produkton laŭ mendiloj estas nova afero aperinta en la lastaj jaroj en la ĉina kamparo.


En Henan-provinco estas vilaĝo, kiu anoncis en la internacia reto en 1998 la akvomelonaĵajn specojn, iliajn trajtojn, areon de la kulturataj akvomelonoj, ilian produktokvanton kaj tempon de ilia

livero. Post nelonge la vilaĝo subskribis kontrakton kun komercistoj de Zhengzhou, Wuhan, Xi'an kaj aliaj urboj kaj faris notarian akton kun ili. Akirinte mendilojn, la vilaĝaj kadroj senprokraste organizis la kamparanojn en produkto de akvomelonoj laŭ postulo de la komercistoj.

Hutubi-gubernio de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono estas kotona bazo. Antaŭ semado ĉi-jare la gubernio organizis aron

da homoj por mendigi la varon. Post klopodo ili akiris mendilojn por la kotono produktota sur la 14 mil hektaroj da kampoj kaj dank' al tio la kotonaj kulturistoj povas trankvile fari la kulturadon.

"Antaŭ ol maturiĝis pomoj, la kulturistoj jam sin okupas je mendigo." Tio estas nova afero en Penglai-vilaĝo, Shandong-provinco. 90% de la laboruloj en tiu vilaĝo kulturiras fruktojn. En la lastaj jaroj ili faris energian entreprenadon pri siaj po-



Pomoj transportataj alloken

moj, registris la markon de siaj fruktoj kaj komencis vendi la fruktojn en la interreto. Foje en iu suda urbo ĝi vendis 5 000 tunojn da pomoj.

En la sistemo de merkata

ekonomio la kamparanoj devas ĉiamaniere eviti ne nur naturajn katastrofojn, sed ankaŭ merkatan danĝeron. La supre dirita laŭmendi-la produkto ja estas ellernita de ĉinaj

kamparanoj en la merkata ekonomio post plurjara provado. Nun ili observas la leĝojn de la merkata ekonomio por eviti blindan produktadon. ■

KURANTAJ AFEROJ

● En 1952 la totala produktvaloraro de Ĉinio estis 67.9 miliardoj da juanoj kaj en 1998 ĝi kreskis al 7 955.3 miliardoj da juanoj, la meza jara kresko estis 7.7%. Nun la totala ekonomia kvanto de Ĉinio okupas la 7-an lokon en la mondo post Usono, Japanio, Germanio, Francio, Britio kaj Italio.

● Nun en Ĉinio estas 34 urbejoj, ĉiu kun almenaŭ miliono da loĝantoj, sed la subtera fervojo funkcias nur en 4 urboj, t.e. Pekino (55.5 km), Ŝanhajo (21 km) Kantono (8.4 km) kaj Tianjin (7.4 km).

● Sudoriente de Tianjin, Ĉinio, oni trovis antaŭ nelonge altkvalitan gas-olean kampon kun rezervo-kvanto de 100 milionoj da tunoj. La tavolo de la tiea oleo dikas pli ol 100 metrojn kaj areoj 60 kvadratajn kilometrojn. La rezervo-kvanto de la natura gaso sufiĉas por bezono de Pekino en 50 jaroj.

● Post sukcesa elkulturado de

hibridigita rizo Ĉinio elkulturis antaŭ nelonge maizon de nova vario, t.e. oleriĉan maizon, altkvalitan internacie. Ĝia hektara produktokvanto egalas al la totala produktokvanto de ordinara maizo, sojfabo kaj verda brutonutraĵo sur la sama areo.

● De 1981 ĝis hodiaŭ en Ĉinio 6 miliardoj da homoj partoprenis en forstumado kaj plantis entute 30 miliardojn da arboj kaj nun 34.25 milionoj da hektaroj da tero estas arbarizitaj.

● La unua kabla akvoskiejo de Ĉinio nun estas konstruata en Changping-gubernio, Pekino. Ĝi estas investita de la Trafika Kompanio de Shangyu, Zhejiang-provinco, kun teknologio de Britio. Post ĝia finkonstruiĝo la akvoskijaj amantoj havos agrablan lokon

por la sporto tute sen bruado, polucio kaj ondoj levitaj de ŝipoj, kaj plie ĝi pagigos malmulte. Ĝi estas utila al multaj akvoskiantoj. S-ro Wang Zuoming, estro de la Akvoskia Kompanio Kaibor en Pekino, diris: "Ĝi estos bona amuzejo por



Al forstumado

la pekinaj loĝantoj, kaj post ĝia ekfunkciado ni starigos akvoskian lernejon kunlabore kun la Ĉina Akvoskia Asocio."

Termobalono en Ĉinio

de YI ZHOU

ŜAJNE malmulte da homoj ne scias, kio estas termobalono, ĉar la heroo de la mondfama novelo "80 tagojn ĉirkaŭ la terglobo" vojaĝis per tiu antikva flugaparato.

Diferenco de la temperaturoj de la aero en kaj ekster la balono donas al ĝi flosforton, kaj dank' al la manipulado de balonisto je la kontrolo de varmeco de la aero en la balono, la balono povas leviĝi, malleviĝi kaj flugi al la celloko sub direktado de la balonisto.

La tuta mondo havas 20 000 termobalonojn kaj preskaŭ ĉiutage okazas konkurso aŭ flugo de termobalono. Nun en Ĉinio termobalonado estas nova amuzo post rokogrimpado, *Bungy*-ludo kaj flosado.

KONGMING-LANTERNO — RUDIMENTO DE TERMOBALONO

Antaŭ 1 700 jaroj en Ĉinio estis homo nomata Kongming. Legendo diras, ke li estis tre saĝa de la infaneco. Ligna birdo, kiun li faris, povis flugi kaj la de li farita ligna fiŝo povis naĝi. Lia pajla drako povis ĉesigi pluvadon kaj evitigi inundon. Foje antaŭ la Lanterna Festo (la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro) guberniestro ordonis al li fari drakan lanternon por lia oficejo, kaj Kongming faris por li paron da lanternoj grandaj kiel domo. En la lanternoj brulis po-

mil kandeloj kaj post nelonge la lanternoj leviĝis sur la ĉielon. Kaj oni nomis ĝin Kongming-lanterno. Tio estas legendo, tamen vere ekzistis tia lanterno. Oni diris, ke tia lanterno estis instrumento en lia komando de milito, kiu rolis kiel la nuna signallumo. Siatempe la rolo de Kongming-lanterno en nokto estis anstataŭigebla per nio alia. Nun en multaj lokoj de Ĉinio oni ankoraŭ havas la kutimon fari Kongming-lanternon. En Xishuangbanna de Yunnan-provinco, kiam okazas la Akvoverŝa Festo, la taj-oj faras tiajn lanternojn kun maksimuma diametro de 12 metroj, kiuj povas ŝvebi pli ol 50 kilometrojn.

En la urbo Xiangfan de Hubei-provinco, kiam okazas kultura festivalo memore al Kongming, oni nepre faras Kongming-lanternojn kaj ellasas ilin en la aeron.


Ĉu Kongming-lanterno estas rudimento de la nuna termobalono?

TERMOBALONO EFEKTIVIGIS LA HOMAN REVON FLUGI

En la 18-a jarcento,

inspirite de leviĝo de papercindro el forno, francaj laboristoj en paperfabriko en Liono plenigis papersakon per varma aero, kaj la sako leviĝis supren. Somere de 1783 ilia plibonigita modela balono kun perimetro de 110 futoj flugis 1.5 mejlojn. La 21-an de novembro de la sama jaro, iu germana doktoro stiris la unuan pasaĝeran termobalonon faritan de la francoj. Ili flugis 4 mejlojn

La Zhonghang-a Klubejo de Termobalona Sporto en Pekino



Antaŭ leviĝo al la ĉielo



kaj la flugado daŭris 25 minutojn. Oni povas diri, ke 120 jarojn antaŭ la invento de aeroplano de la fratoj Wright, flugis en la aero homoj jam per termobalono.

Dank' al progreso de tekniko, termobalona flugado jam fariĝis populara sporto tra la tuta mondo.

Nun la monda ĉampioneca konkurso de termobalona flugado okazas en ĉiu dua jaro, la interkontinenta konkurso — ĉiujare kaj invit-konkursoj — ofte en multaj landoj. Pro la buntaj koloroj kaj gracia flosado de balono, multaj grandaj entreprenoj prenis balonon kiel sian propagandilon. Ekzemple en konkurso balono de trinkaĵo-kompanio ofte prenas la formon de ladbotelo de trinkaĵoj, kaj tiu de ŝuo-kompanio formiĝas kiel giganta ŝuo.

TERMOBALONO SURTERIĜIS EN ĈINIO

La termobalona sporto estas tre populara en evoluintaj landoj, ĉar ĝi havas la karakterizaĵojn de sporta konkurenco, amuzo kaj demonstrado de entreprenoj. Tial ĝi tuj vekis vastan atenton de diversaj flankoj de la socio, kiam ĝi aperis en Ĉinio.

Septembre de 1982, usonano venis al Ĉinio kune kun sia termobalono nomata "Usona-Ĉina Amikeco" kaj faris flugon. Tio komencis la termobalonan sporton en Ĉinio. En aŭgusto de 1983 ĉinaj balonistoj faris unuafojan flugon en Ĉinio. En aprilo kaj oktobro de 1987 Ĉinio okazigis la tutlandan konkurson kaj internacian invitkonkurson de termobalono. Post tio pli ol 70 termobalonoj aperis en grandaj urboj de Ĉinio. En aprilo de 1990, tri termobalonoj leviĝis sur Hainan-insulo, transflugis Qiongzhou-markolon kaj falis sur Leizhou-duoninsulon. Tio estis la unuafoja transmara flu-

go de ĉina termobalono. En 1991 ĉinaj balonistoj helpis britajn kolegojn transflugi Himalajon de Nepalo al Tibeto, kaj la alteco de la flugado estis 10 000 metroj. En 1993 ĉinaj balonistoj helpis japanan termobaloniston transflugi la Orientan Ĉinan Maron ekde Rudong-gubernio norde de Ŝanhajo al Kjuŝu de Japanio, kaj la flugdistanco estis 930 kilometroj. En 1994 kun helpo de ĉinaj kolegoj korea termobalonisto ekflugis de Rongcheng de Shandong-provinco, transflugis la Flavan Maron kaj surteriĝis en Inĉo de Koreio, kaj la flugdistanco estis 400 kilometroj. Ekde 1999 Ĉinio regule okazigos tutlandan ĉampionecan konkurson de termobalonado.


PLI KAJ PLI MULTIĜAS ŜATANTOJ DE TERMOBALONO

Libere flugi en la aero estis revo de la homaro dum longa tempo. En la lastaj jaroj, pli kaj pli

multiĝis ŝatantoj de termobalona sporto en Ĉinio. Antaŭe, kelkaj aerosportaj lernejoj, termobalono estis tute fremda por plejparto de la ĉinoj, kiuj vidis termobalonon nur en televidado kaj ne havis la ŝancon persone partopreni en tiu sporto. Termobalona sporto tiam estis kloŝita en mistera nimbo.

En septembro de 1999 fondiĝis en Pekino privata klubo de termobalona sporto. Al ĝi estis permesita havi specialan terenon por balonflugado. Post faka trejnado oni povas ricevi licencon pri termobalona flugado kaj flugi sole aŭ helpe de balonisto.

La balonklubo kunlaboros kun turismaj servoj por ke pli multaj homoj ĝuu la plezuron flugi per balono. ■



Neforgesebla gastado en Pollando

de HAN ZUWU

DE la 21-a de aŭg. ĝis la 3-a de sept. 1998, s-ro Liu Shugong, asista ĝenerala sekretario de la Tianjin-a Federacio de Socisciencaj Asocioj, s-ro Gao Chengyuan, vicprezidanto de la Tianjin-a Esperanto-Asocio, kaj mi estis invititaj al Pollando por la 90-jara Jubileo de Esperanta Movado en Lodzo kaj ankaŭ por la 29-a Pola Esperanto-Kongreso. La 14-taga vizitado neforgeseble gravuriĝis en mia esperantista vivo, kaj mi profunde perceptis la praktikan valoron kaj senliman vivi-

povon de Esperanto. Kvankam pasis jam pli ol unu jaro post nia gastado, tamen mi ankoraŭ freŝe memoris tion kaj kun emociiĝo verkis tiun ĉi artikolon.

JUBILEO KAJ KONGRESO

La solena jubileo por la 90-jariĝo de E-movado en Lodzo okazis en la 25-a de aŭgusto. Frumatencentoj da polaj kaj alilandaj esperantistoj kolektiĝis en la E-klubo de Lodzo en la urbocentro. Je la 10-a komenciĝis parado. Orkestro en blua uniformo antaŭiris la paradantojn, kaj ĝin tuj sekvis estrarano de la Esperanto-Asocio de

Lodzo, s-ro Robert Kaminski, kun verdstela standardo enmane. Apud li iris du esperantistinoj gardantaj la standardon. Ne estis esprimebla miaj ĝojo kaj emociiĝo, kiam mi troviĝis inter diverslandaj esperantistoj en la naskiĝlando de Esperanto. La paradantoj haltis en Zamenhof-strato, kaj pola samideano konigis ĝian devenon. Multaj samideanoj sin fotis antaŭ la nomtabulo kun reliefo de la kapo de Zamenhof. Raportistoj de televidaj stacioj ĝustatempe registris la signifoplenajn scenojn.

Pli ol 200 esperantistoj ĉeestis la jubilean ceremonion en la Ŝtata Biblioteko de Lodzo. La ceremonio komenciĝis per bela virina kantado de la koruso Eho. Poste estis poemo-deklamado, teatraĵo-prezentado k.a. La teatraĵo ludata de junaj esperantistoj profunde impresis min. Post aprecado de la teatraĵo ni vizitis Esperantan ekspozicion. En la eksponejo ni vidis abundon da Esperantaj libroj, gazetoj, historiaj materialoj kaj fotoj de Pollando kaj aliaj landoj, kaj ankaŭ multe da leteroj kaj memoraĵoj reciprokita de esperantistoj de diversaj landoj.

En la 28-a de aŭgusto ni partoprenis en la 29-a Pola Esperanto-Kongreso en la Muzeo de Filmo. En la kongreso partoprenis ankaŭ esperantistoj el Nederlando, Danio, Germanio, Francio, Hungario kaj Ukrainio.

INTERKOMUNIKADO

LKK okazigis nacian vesperon speciale por la ĉinaj samideanoj en la 25-a de aŭg. Antaŭ ol

La aŭtoro (la unua de dekstre en la unua vico) kaj polaj samideanoj





Partoprenantoj de la 29-a Pola E-Kongreso

komenciĝis la vespero, la halo jam estis plena de samideanoj. Ni ne lertas en kantado kaj danado, do ni projekciis al la ĉeestantoj lumbildojn pri la Esperanta movado de Tianjin kaj videobendon pri la historio, kulturo, ekonomio kaj moroj de Tianjin. Ni rikoltis varman aplaŭdodon kaj salvon da demandoj: "Kiom longe Tianjin distancas de ni?" "La bela aspekto kaj gastronomio de Tianjin interesas nin, sed kiamaniere ni povas veni al Tianjin?"

"Kia estas la klimato de Tianjin?" Kaj iuj bedaŭris, ke la videobendo estas tre mallonga. Ni esperis, ke niaj respondoj estos kontentigaj por ili.

En la 29-a, mi partoprenis en kunsido pri instruado, kiun gvidis s-ino Danuta Zelinska, respondeculo de la Pola Esperanto-Asocio pri instruado. Ŝi parolis pri Esperanta instruado en diversaj lokoj de Pollando kaj konigis laborplanon por la estonteco. S-ino Mila V. D. Horst-Kolinska

el Nederlando konigis la Esperantan instruadon en Nederlando kaj la aktivadon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ankaŭ mi raportis pri la Esperanta instruado en Tianjin, kaj kiam mi menciis, ke al ni mankis ekzemple aŭdo-vidaj materialoj, s-ino Horst-Kolinska tuj promesis helpi nin. Kaj unu monaton post mia reveno al Tianjin mi ricevis de ŝi poŝsendaĵon pri "Mazi en Gondo-lando" kaj aliaj materialoj.

AMIKECO

En Pollando ni ne nur perceptis la grandan vivipovon de Esperanto, sed ankaŭ ĝuis la belecon de urboj kaj de la naturo. Sed la plej kortuŝa kaj neforgesebla estis la amikeco de polaj kaj alilandaj samideanoj.

Post nia atingo de Pollando, ni ne maltrankviliĝis pri nia itinero. Dum la tuta vojaĝo polaj samideanoj pretigis por ni jen biletojn jen veturilon, kaj ni ĉiam estis akompanataj de ili, kiuj helpis nin kiel samfamilianoj. Tuj en la tago, kiam ni atingis Lodzon, mi volis boligi akvon por infuzi teon per mia elektra taso, sed mi trovis, ke ĝia ŝtopilo ne adaptiĝas al la ŝtopilingo en la hotelo. Tion sciinte, s-ino Zofia alportis al ni en la sekvanta tago sian elektran termoson, kaj ni uzis ĝin ĝis nia lasta tago en la hotelo. S-ino Janina Januszkiewicz, estrarano de la Lodza Esperanto-Ligo, invitis nin loĝi en ŝia hejmo. Ŝi estis tiel afabla kaj familiara, ke ni sentis nin kiel en nia propra hejmo. Kuiristino de la hotelo ne scipovas Esperanton, kaj ŝi salutis nin en la rusa lingvo kaj ofte demandis nin kun granda afableco: "Ĉu la manĝaĵoj plaĉas al vi?" "Ĉu sufiĉas por vi?" "Ĉu ankoraŭ iom pli por vi?"... Ni ne forgesos la polajn pladojn preparitajn de Anna Stepien, la rostitan viandon kaj bieron de Ireneusz Babrzak, la belan koncerton kaj balon en vespero. ■

Senŝanceliĝaj esperantistoj

—Pri la Huangshi-a Esperanto-Asocio

de XIANG HONG

EN la historio de la ĉina Esp-movado Huangshi estis fama urbo. En la fino de la 70-aj jaroj kaj la komenco de la 80-aj jaroj ĝi organizis multe da influaj Esp-aktivadoj, kiuj allogis kaj kulturis Esperantajn lernemulojn. Iuj diris, ke la Huangshi-a Esperanto-Asocio (HEA) estas standardo de la ĉina Esp-movado. Post kelkaj silento kelkaj bravaj kaj fervoraj esperantistoj de Huangshi lanĉis la mirigan aktivadon “Piede transiri la Eŭrazian Ponton”. Huangshi refoje vekis la atenton de la publiko.

Pri tio la kvara kaj sepa numeroj de “El Popola Ĉino” jam raportis. De la 1-a de januaro ĝis la 12-a de julio 1999 la piedira grupo laŭ plano plenumis la ĉinan itineron inter Lianyungang de Jiangsu-provinco, la orienta fino de la ponto, kaj Alataw-montpasejo de Xinjiang, tra kiu oni povas eniri la Centran Azion. Ili piediris 4 108 km en 6 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj intencis ripozi 2 monatojn. Se ne estos problemo, ili atingos en aŭgusto 2000 la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo post trapaso de Kazahstano, Rusio, Belorusio, Pollando kaj Germanio. Huangshi-aj esperantistoj nomis la aktivadon “Vojaĝo trans Jarcenton”.

Se vi bone konas la evoluan historion de la movado de Huangshi kaj ties esperantistojn, vi ne miras pri ilia transjarcenta vojaĝo,

ĉar la vojaĝo prezentas la karakteron de la senŝanceliĝaj Huangshi-anoj.

FRUKTODONA LABORO

Mi pensas, ke ilia spirito originis eble de la antikveco. Jen kial Huangshi fariĝis unu el la luliloj de la bronza kulturo.

Fine de la 70-aj jaroj la okcidenta kulturo kontinue eniris en Ĉinion kaj ĉinoj havis diversajn lernoŝancojn, interalie lerni fremdajn lingvojn fariĝis furoro. Tial multaj ĉinoj ekkonis Esperanton. Kun obstina karaktero Huangshi-anoj fervore lernis Esperanton, kio influis la tutan landon. Tiam en Huangshi troviĝis mil lernantoj de Esperanto kaj en aliaj urboj estis ankaŭ lernantoj de ĝia koresponda kurso, inter kiuj estis elstara ĉina junulino Zhang Haidi, kriplulino de Shandong-provinco, scipovanta kelkajn fremdajn lingvojn. HEA fondiĝis en aprilo 1981. Poste ĝi sin preparis por inviti la Ĉinan Kongreson de Esperanto, kun mil aliĝintoj. Sed bedaŭrinde, ĝi ne sukcesis pro iaj kaŭzoj. Fine en julio de la sama jaro ĝi okazigis simpozion, kiun partoprenis pli ol 200 personoj el diversaj provincoj. Menciante la simpozion, esperantistoj de Huangshi nomas ĝin “malgranda UK”. Post la simpozio ili redaktis kaj eldonis “Adresaron”, kiu enhavas la adresojn de 1 054 aliĝintoj de la abortinta kongreso supre menciita. Dume ili eldonis ankaŭ “Jarkunveno de la Hubei-a Espe-

ranto-Asocio (prepara) kaj simpozio de 1981”. La koncernatoj s-roj Hu Guozhu kaj Yuan Zegao memoris, ke en redaktado kaj eldonado de la du libroj ili renkontis multe da malfacilaĵoj. Sed la du libroj jam fariĝis historiaj materialoj utilaj por la Esp-movado de Ĉinio.

Novembron de 1984, HEA kun 8 Esperantaj organizoj okazigis la Ĉinan Esperantan Simpozion pri Scienco kaj Tekniko, kiun partoprenis 127 esperantistoj, sin okupantaj pri scienc-teknika laboro, el 25 provincoj kaj municipoj. Tiam Huangshi estis fama ĉina urbo por esperantistoj, ke samideanoj el pli ol 20 landoj vizitis ĝin. En 1985 s-ro Zhang Qicheng, tiama ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, vizitis Huangshi kaj kun ekscitiĝo diris: “Huangshi estas malgranda, tamen granda por esperantistoj.”

REBRILOS LA MOVADO

En la lastaj jaroj la ĉina Esp-movado ne tiom viglis pro tio, ke oni devis pli prizorgi siajn vivkondiĉojn influitajn de la reformado de la sistemo de bonstatiga domdistribuo kaj reformado de kuracaj pagoj kaj salajra sistemo. Ankaŭ Huangshi ne estis escepto. Sed ankoraŭ ekzistas iuj fervoraj esperantistoj, kiuj ne forgesis lerni, disvastigi kaj apliki Esperanton. En 1996 s-ro Wei Guangliang fariĝis nova ĝenerala sekretario de HEA. Li rigardas disvastigon de Esperanto kiel batalon en sia vivo.



Piedira vojaĝo de e-istoj de Huangshi

Fronte al la malfavora situacio, li ellaboris orientilon “firme teni la terenon, repreni la perditan teron kaj disvastigi la spacon”. Li alvokis, ke esperantistoj levu sian lingvan nivelon kaj serĉu realan starpunkton por Esperanto. En la lastaj du jaroj la asocio renormaligis monatan kunvenon kaj semajnan aktivadon de Esp-lernado en la kultura palaco. Ĝi eldonis denove sian revuon “Nova Floro”, venkinte diversajn malfacilaĵojn. Pli ol 100 Huangshi-aj esperantistoj fariĝis denove ĝiaj legantoj. Por disvastigi Esperanton en pli multajn lokojn Huangshi-aj esperantistoj lanĉis la aktivadon “Piede transiri la Eŭrazian Ponton”. Inter la piedirantoj estas 4 Huangshi-aj esperantistoj kaj 2 el alia urbo. Ili transpasis Gobion kaj altebenaĵon kaj spertis sabloŝtormon kaj varmegon por provoki sian fiziologian limon. Ilia senŝanceliĝo kortuŝis la homojn, kiuj priantis ilin. Dum la vojo ili

prelegis por propagandi Esperanton kaj kontaktiĝis kun alilokaj esperantistoj, por ke ili vidu la koheran forton de Esperanto.

Dank’ al subteno de la bravaj esperantistoj, Wei Guangliang kredis, ke certe rebrilos la Esperanta movado de Huangshi. ■

Nekrologo

S-ro Ken’iti Matumoto (1910-1999) forpasis la 4-an de aŭgusto en Berlino dum la 84-a UK. Li estis kasisto de la 50-a UK en 1965 en Tokio kaj iama estrarano de la Japana Esperanto-Instituto (JEI). Li havis meritojn pri la nuna oficejo de JEI en la centro de Tokio. Li kunprizorgis la japanan parton de la Internacia Komerca-ekonomika Vortaro de F. Munniksma (1990). Li ofte vizitis universalajn kongresojn. Li fervore subtenis kaj konstante helpis “El Popola Ĉinio”. Lia forpaso tre doloras nin, kaj ni kore kondolencas liajn familianojn.

La Red.

Teksto de WANG HANPING

Fotoj de WANG HANPING kaj YU TAO

LA 22-25-an de aŭgusto 1999 okazis en Hanojo, ĉefurbo de Vjetnamio, la Dua Azia Kongreso de Esperanto, la lasta kontinenta renkontiĝo de aziaj e-istoj en la kuranta jarcento. En ĝi partoprenis 420 e-istoj el 16 landoj.

Dum la pasintaj tri jaroj, post la Unua Azia Kongreso de Esperanto okazigita de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) en Ŝanhajo en 1996, diversaj E-organizoj de aziaj landoj intensigis kontaktiĝon kaj kunlaboron inter si, kaj la E-movado progresis rimarkinde. Pro diversaj kaŭzoj la ĉina E-movado ne estis tiel vigla kiel en la 80-aj jaroj, tamen dank' al la ekonomia evoluo en la lastaj jaroj pli kaj pli multaj ĉinaj e-istoj aperis en internaciaj Esperan-

taj kunvenoj. Ĉi-foje pli ol 60 ĉinaj e-istoj partoprenis en la kongreso en Hanojo post la Kvara Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en Guilin, Guangxi. Jen la plej granda nombro de ĉinaj e-istoj en E-kongreso okazinta alilande. 149 japanaj e-istoj ĉeestis la kongreson. Ilia delegacio estis la dua granda nur post la vjetnama. En la kongreso partoprenis ankaŭ tri laosaj e-istoj. La kongreso multe antaŭenigis ĝian movadon en Vjetnamio.

La kongresa temo estas: Kunlaboro por paco, stabileco kaj disvolviĝo. Ĉe la fino de la 20-a jc. oni elmetis tiun temon por diskuti en Hanojo honorita de Unesko kiel Urbo de Paco, kio havas apartan signifon. Dum diskutado pri la kongresa temo, la ĉeestantoj donis grandan atenton al intensigo de kunlaboro kaj helpo inter diversaj E-organizoj de aziaj landoj, interŝanĝo de informoj pri E-movado kaj ebleco de kunlaboro en Esperanta turismo.

Azia kongreso ĉe la sojlo de nova jarcento



Riĉis la kongresa enhavo. En la salonoj kun nomoj de eminentaj e-istoj de Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Vjetnamio, junuloj, virinoj, fervojistoj, medicinistoj kaj komercistoj kunsidis kaj diskutis pri sia profesia agado. Viglis ankaŭ la kunsidoj de SAT, EPĈ-legantoj, azia movado, vjetnama milito, k.a. Menciindas, ke en la kunsido de Libro-kulturo ĉinaj, japanaj kaj koreaj e-istoj prezentis al la kongresanoj Esperantajn librojn nove eldonitajn post la Unua Azia Kongreso de Esperanto kaj ankaŭ vjetnamaj e-istoj montris siajn Esperanta-Vjetnaman Vortaron kaj interesajn Esperantajn librojn. La kunsido de junaj e-istoj estis aparte vigla kun multnombraj ĉeestantoj. Ili konigis sian E-agadon kaj esprimis la deziron partopreni en la 56-a Internacia Junulara Kongreso okazonta en Hongkong en aŭgusto 2000.

La vjetnama E-movado havas bonan tradicion. Kiam



La solena inaŭguro



Gaja babilado de kongresanoj



Kongresanoj antaŭ la arbo Zamenhof ĵus plantita

la vjetnama popolo batalis por paco kaj sendependeco, internaciaj E-rondoj donis al ĝi grandajn helpon kaj subtenon. Por esprimi dankemon de la vjetnama popolo, la vjetnamaj e-istoj disdonis medalojn al iuj e-istoj, en la nomo de la vjetnamaj registaro kaj E-asocio. La lasta donacis amikecajn silkajn flagojn al UEA, KAEM, E-asocioj de Ĉinio, Japanio kaj Koreio.

Dank' al la zorgema preparado de vjetnamaj e-istoj la kongreso akiris grandan sukceson. Tion oni ŝuldis ankaŭ al la subteno de la vjetnama registaro. La kongresejo estas tre moderna kaj luksa kaj sidas en la kvinstela hotelo Horison, eble la plej bona en Hanojo. Kiel alta protektanto de la kongreso, s-ino Nguyen Thi Binh, vicprezidanto de la Vjetnama Socialisma Respubliko, ĉeestis la solenan inaŭguron kaj faris paroladon. S-ro Nguyen Manh Cam, vicĉefministro de Vjetnamio kaj ministro de eksteraj aferoj, intervidiĝis kun delegitoj el diversaj landoj. Li opiniis, ke Esperanto prezentas belan perspektivon al kunlaboro de la tuta mondo, kaj esprimis, ke li lernos Esperanton. Diversaj vjetnamaj amaskomunikiloj raportis pri la kongreso, kio disvastigis la influon de Esperanto en Vjetnamio. Nun multaj vjetnamaj junuloj eklernis Esperanton. ■



Vjetnamaj artistoj prezentantaj programeron



Subskribado sur memorajo



Ĉinaj kaj vjetnamaj artistoj prezentantaj solidarecon



Kunsido de junulara agado

Valoro de la vivo

de YANG XIAOYUN

EN orfejo vivis iu knabo. Kun pesimismo li ofte demandis la estron de la orfejo: "Ĉu havas signifon la vivo de knaboj sengepatraj kiel mi?"

La estro silentis kun rido.

Iutage la estro donis al li ŝtonon kaj diris: "La sekvantan matenon vendu la ŝtonon en bazaro, sed kiom ajn oni pagos, nepre malkonsentu."

La sekvantan matenon la knabo kaŭris ĉe angulo de la bazaro. Neatendite, multe da homoj volis aĉeti la ŝtonon kaj proponis pli kaj pli altan prezon. Reveninte en la orfejon, kun emocio la knabo raportis tion al la estro, kiu ridetis kaj ordonis al li vendi la ŝtonon en orbazaro. En la orbazaro oni volis aĉeti ĝin eĉ per mono dekoble pli granda ol en la menciita bazaro.

Fine la estro ordonis al la knabo montri la ŝtonon en gembazaro. Rezulte ĝi fariĝis dekoble pli kara ol en la orbazaro. Eĉ tiam la knabo ankoraŭ ne volis vendi ĝin. Do ĝi diskoniĝis kiel kuriozaĵo.

La knabo ĝoje portis la ŝtonon al la orfejo kaj rakontis tion al la estro, kiu malrapide diris al li: "La vivo kiel tiu ŝtono havas diversajn valorojn en diversaj medioj. La ŝtono pli kaj pli valoriĝas pro via domaĝo kaj fariĝas kuriozaĵo. Ĉu vi ne sentas vin kiel la ŝtonon? Se nur vi alte taksas kaj domaĝas vin, via vivo estos valora!" ■



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* KOMENCANTO - tre interesa internacia revuo. Poŝtkesto 132, Ekaterinburg, 620041, Ruslando.

* Zaran Bozinovic, 14-j. Knabo, dez. kor. tm., interesiĝas pri muziko, libroj, amuzado, E-

movado kaj multaj aliaj temoj. Adr.: Dure Salaja 23A/1, 19000 Zajecar, Jugoslavio.

* Yunior Sanchez R, 20-j., dez. kor. tm. Adr.: P.O. Box 555, Holguino, CP 80100, Kubo.

* S-ino Gunta Lepeta, 49-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: 13 Nod. Filozofu Iela. 69, P.N.S. Gintermuiza, Jelgava, LV-3001, Latvio. (Tel.: 371-37-23585)

* S-ro Vigo Gailis, 36-j., respondos al ĉiu letero kun foto. Adr.: P/N Kronauce, LV-3720, Dobeles Raj., Latvio. (Tel.: 371-37-68685)

"La Familio" de Bakin

de LAŬLUM

"La familio", verkita de Bakin, fama ĉina verkisto, honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, tradukita de Wei Yida kaj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en novembro 1999. 548 paĝoj. Formato: 1168 X 850 mm. Prezo: 22.00 USD. Sendokosto: 5.00 USD.

La romano rakontas al ni la amon de Juehui, la tria filo de riĉa eksguberniestro, al servoknabino Mingfeng, la amon de lia pli aĝa frato Juemin al sia kuzino kaj la amon de lia plej aĝa frato Juexin al la kuzino Mei, kiu devis rezigni sian korinklinon al Juexin kaj edziniĝi al neamata viro, pro interveno de la patrino. Juexin devis edziĝi al bela kaj milda knabino Ruijue, tamen ne povis vivi sen bedaŭro, pro sufero de Mei, kiu poste mortis juna pro ĉagreno. Juehui verŝis al Mingfeng sian koron kaj promesis ŝin edziniĝi, sed lia avo donacis tiun 17-jaran servoknabinon al sia riĉa maljuna amiko Feng kiel konkubinon. Juehui streĉe sin okupis en lukto de studentoj kontraŭ maljustaj militistoj kaj preteratentis la helpopeton de Mingfeng. En malespero, la knabino sin dronigis en lageto de la familia ĝardeno kaj alia servoknabino devis konkubiniĝi al Feng anstataŭe. Juehui indigniĝis pro tio kaj decidis ribeli kontraŭ la feŭdisma familio sub la regado de lia despota avo.

La avo decidis fianĉigi Juemin al nevino de Feng. Juemin malobeis lin kaj sin kaŝis. La avo indigniĝis pro lia ribelo kaj taskis Juexin eltrovi kaj hejmenvenigi la pli junan

fraton, kies kaŝejon sciis Juehui, kiu tamen rifuzis kunagi.


La kvara kaj kvina onkloj de Juehui kaŝe luis domojn por loĝigi siajn kromvirinojn. Informiĝinte pri tio per denunco, lia avo koleregis, malsaniĝis pro konfliktiĝo kaj mortis. Sekve de tio okazis kvarelo inter liaj filoj pro la heredaĵoj. Pro superstiĉa kredo, ke akuŝo povas suferigi la animon de la mortinto, la edzino de Juexin, kiu baldaŭ akuŝos, estis forsendita en kamparon kaj pro manko de ĝustatempa medicina helpo mortis de malfacila akuŝo, kio dolorigis la koron de Juexin, kiu eĉ ne povis vidi sian amatan virinon dum la krizo, pro malhelpo de la parencoj superstiĉaj.

Juehui, kiu diligente studis progresemajn librojn kaj gazetojn kaj energie laboris por redakti gazeton por junularo, neniel povis plu toleri la kunvivon en la familio kaj decidis ĝin forlasi kaj forveturi al la urbo Ŝanhajo, kie ardis la progresema movado kaj brilis la espero de la nova generacio.


Per la rakonto pri batalo de la juna generacio, kun Juehui kiel la

reprezentanto, kontraŭ la feŭdisma forto, reprezentata de lia avo, en la granda familio de kvar generacioj sub la sama tegmento, la romano "La Familio" de Bakin prezentas al ni la progreseman tendencon de la ĉina junularo en la periodo de la dudekaj jaroj. Tiu majstra verko ludis gravan rolon en la batalo kontraŭ feŭdismo kaj donis grandan influon al la ĉina junularo en la tridekaj jaroj post sia apero en 1931 en la ŝanhaja ĵurnalo "Tempo", kaj poste libroforme en 1933. Sub ĝia kuraĝigo, multaj junuloj komencis sian bravan batalon kontraŭ feŭdismo por progreso de la socio. "La Familio" estas ne nur unu el la ĉefverkoj de Bakin, sed ankaŭ unu el la monumentoj en la historio de la ĉina moderna beletro. ■





En Makao



La fasado de la preĝejo Sankta Paŭlo

Teksto de ZHAO XI

Fotoj de WEI XIUTANG
kaj ZHANG MEIZHI

En la 20-a de decembro 1999 Makao revenos al Ĉinio, kio metos la finon al la koloniisma okupado de pli ol 400 jaroj.

Makao situas sur la okcidenta bordo de la enfluejo de Perlo-Rivero, rigardante Hongkong transe de la akvo. La insulo kun la orienta kaj okcidenta kulturoj estas fascina urbego fama pro siaj arkitekturo, ekonomio, financo, turismo kaj hazardludo.



La Ponto
Taipa



En preĝejo



Surstrata prezentado




Dancantaj
drakoj

Ripozantoj

Foto de ZOU YI







Grandioza festado

Fotoj de ZHAO XI kaj LIU SIGONG

La 1-a de oktobro 1999 estis la 50-a datreveno de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En la sama tago antaŭ 50 jaroj la lando kun 5000-jara historio komencis siajn firmajn paŝojn al moderna civilizacio.

Por soleni la Nacian Tagon, oni okazigis en Pekino grandan ceremonion kun 500 000 partoprenantoj: parado de armeo, diversaj belaj paradveturiloj kaj vespero de prezentoj kaj artfajraĵoj. En tiu tago Tian'anmen-placo estis saturita de majesta festa etoso. Ĉie bonodoris belaj floroj kaj ridis gajaj vizaĝoj...

Tio estis la plej grandioza ceremonio en la pasintaj 50 jaroj en Ĉinio. Ĝi manifestis novan fizionomion de la prosperanta Ĉinio. En la honora spektejo ĉiuj estis ravitaj de la pompo de la festado kaj kortuŝitaj de la granda ŝanĝiĝo de la nova Ĉinio. Ili senĉese aplaudis la paradantojn kaj esprimis la komunan deziron: Prosperon al vi, Ĉinio!

Jen informoj de niaj raportistoj pri la solenado kaj impresoj de islanda samideano pri Pekino.

Pompa ceremonio

de MEI ZHI

JE la 5-a horo de la 1-a de oktobro raportistoj kolektiĝis por iri al Tian'anmen-placo. Tiam falis pluveto, tamen kiam ni atingis la lokon de kolektiĝo, mi vidis tie ĉ. 200 homojn, inter kiuj estis multaj alilandaj raportistoj kaj fotistoj kun diversaj fotoaparatoj en

la manoj aŭ sur la ŝultroj.

Kiam nia aŭto atingis la difinitan lokon, ĉesis la pluvo kaj aperis matenruĝo. La nove dekorita Tian'anmen-pordego aspektis aparte impone. La grandaj palacaj lanternoj pliigis la festan etoson. Silentis Chang'an-strato, kiu estas movoplena en ordinaraĵoj, dum sur la placo estis jam 100 000 geknaboj,



Por raportado

kiuj atendis tie por formi bildo-fonon de la solenado. En samaj vestoj ili tenis diversajn paperajn florojn en



la mano por formi bildojn. Knabino kun ruĝa girlando sur la kapo diris al mi, ke ŝi estas elementlernejano kaj por la hodiaŭa solenado ŝi kaj ŝiaj kamaradoj estis trejnataj jam duonjaron.

“Ĉu tio malhelpas vian lernadon?” demandis mi.

“Ne! Ne ĉiuj partoprenis la trejnadon, tial niaj instruistoj donis al ni apartajn lecionojn por helpi nin.” Ŝiaj vortoj elspiris fieron.

Ĉiujare en la Nacia Tago en la 50-aj kaj 60-aj jaroj okazis en Pekino parado, sed en la 70-aj jaroj ĝi estis anstataŭigita per amuzado en parkoj. Mi memoras, ke kiam mi lernis en elementa lernejo, ankaŭ mi partoprenis similan aktivadon por solenado de la Nacia Tago.

Je la 10-a horo komenciĝis la solena ceremonio. La ĉeestantaro retenis la spiradon por aŭskulti la salutan kanonadon. Aŭdiĝis ankaŭ paŝbruoj de 200 gardistoj de la nacia

flago, kiuj majeste iris al la flagostango. Leviĝis la flago de nia respubliko. Imponis la nacia himno ŝvebanta super la placo. Tio estis la momento, en kiu ĉiu ĉino estas fiero kaj ekscitita, kio rememorigis la neforgeseblajn spektaklojn en la sama tago antaŭ 50 jaroj.

La ceremonia gardantaro iris en la fronto de la paradaj trupoj. Ĝin sekvis 17 kvadrataj grupoj el malsamaj militistaj specoj. Ili ĉiuj heroe marŝis per paradaj paŝoj preter la honora spektejo. Tie vidiĝis la avangardaj trupoj kaj armiloj, kiuj montris la progreson de la nacia defendo.

Post la militistaj kvadratoj iris civilaj paradantoj. La diversformaj kaj bele ornamitaj paradveturiloj bone konigis la grandajn sukcesojn de la ĉina popolo en la moderna konstruado. La vasta placo ekbolis de ĝojo. Ĝi aspektis kiel maro de floroj kaj homoj...

Gaja vespero

de XIANG HONG

SE oni diras, ke la taga parado estas impona, do la vespera etoso sur Tian'anmen-placo estas saturita de karnava-

leco.


Je la 8-a vespere, apenaŭ anoncisto finis la vortojn por deklari la amuzan vesperon malfermita, ekbrilis artfajraĵoj en la ĉielo, leviĝis muziko, tambura-

do kaj huraado de 100 000 ĉeestantoj. Tiam oni ne povis distingigi, kio estas pli bela: ĉu artfajraĵoj en la ĉielo, ĉu koloraj lanternoj sur la tero, ĉu belaj vestoj de la ĉeestantoj aŭ ties ridantaj vizaĝoj?

La plej okulfrapaj amuzoj okazis en la centra loko antaŭ Tian'anmen-pordego. Tie artistoj el Chongqing kaj Guangdong prezentis leon-dancon, 2 000 homoj ludis tamburadon kaj tamtamadon, kaj diverslokaj nacimultiplimultanoj prezentis dancon. En la vespero la ĉinoj esprimis sian ĝojon per kanto, danco, opero, akrobataĵo k.a. Ili montris siajn sincerajn bondezirojn al la patrio. Ĝuste la vespera temo estis “Bondezirojn al la patrio”.


Sude de la centra tereno de la placo estis aparte vigle. Tie preskaŭ ĉiuj aktorinoj kaj spektistinoj. Studentoj kaj ŝtatoficistoj alterne kantis, dancis kaj ludis muzikon. Ĝus finiĝis la gracia virina *kalisiten-o* de la Ĉefurba Medicina Universitato, knabinoj el la Ĉefurba Normala Universitato komencis prezenti la modernan dancon. “Celebro de la venko” ludata de la Centra Konservatorio per blov-instrumento *surnao* altiris al si pli multajn spektantojn. Ĉiufoje, kiam eksonis muziko de kolektiva danco, preskaŭ ĉiuj stariĝis, kune kantis kaj dancis. Kia gaja spektaklo! Energie laboris ĵurnalistoj de diversaj landoj. Ili kaptis la memorindajn scenojn per sia fotilo.

Aparte belaj estis la artfajraĵoj. En la du-hora amuza vespero artfajraĵoj de 200 specoj lumis 4 fojojn, entute 40 minutojn. La mirinda artfajraĵo “Stelo de Makao” prezentis klaran bildon de kvin steloj. La muzikaj artfajraĵoj povis ŝanĝi sian koloron, akompanate de muziko. La vespero atingis sian kulminon en lumado de la artfajraĵoj.



Parado sur la placo Tian'anmen

Foto de WANG DEYING




Revujo de la aera forto



"Leonoj" dancantaj

Grandioza festado



Maro de homoj kaj floroj



El nacimallimultanoj



Gepatroj kun sia infano



Bildo formita de geknaboj kun paperaj floroj Foto de YUAN XUEJUN



Elementlernejanoj en parado



Mi spertis festadon kaj ŝanĝiĝon en Pekino

de **RAGNAR BALDURSSON**
(Islando)

MI venis por la unua fojo al Pekino en la jaro 1975 kiel 19-jara studento por studi filozofion kaj koni Ĉinion. Mi

S-ro Ragnar Baldursson en sia oficejo



elgradiĝis en 1979 en la 30-a jubilea jaro de la Ĉina Popola Respubliko, kiam Ĉinio ĵus ekmalfermiĝis al ekstera mondo.

Dudek jarojn post mia unua alveno al Ĉinio mi revenis kiel diplomato de la islanda ambasadorejo en Ĉinio. Kaj ĉi-jare mi havis la honoron partopreni la 50-jaran jubileon de la Ĉina Popola Respubliko. La jubilea preparado kaj solenado impresis min profunde. Kvankam nur malmultaj el la 12 milionoj da loĝantoj de Pekino povis ĉeesti la solenadon, tamen mi rimarkis, ke preskaŭ ĉiuj pekinanoj estis okupitaj pro la jubilea aktivado. Oni povas diri, ke por la 50-jara jubileo la tuta Ĉinio ekagis. Pekino havigis

al si tute novan fizionomion, kiu substrekis la grandan ŝanĝiĝon en la urbo, kiu jam fariĝis granda metropolo je monda nivelo.

La ŝanĝiĝo de Pekino en la lastaj dudek jaroj estas tiel grandaj, ke je mia reveno al Pekino mi tute ne povas rekoni multajn lokojn, kiujn mi ofte vizitis, kvazaŭ fremda urbo en kiu mi neniam loĝis. Dum miaj studentaj jaroj en la Pekina Universitato, mi ofte biciklis tra la urbo kaj gastis ĉe esperantistoj. Tiam oni-dire Pekino estis la plej granda vilaĝo en la mondo, kaj la Pekina Hotelo estis la plej alta domo en tiu vilaĝo. Vere, por iri de la universitato al la urbocentro oni preterpasis multajn grenkampojn. Nun tiuj kampoj jam estis anstataŭigitaj per loĝkvartaloj kun movoplenaj stratoj, kaj la Pekina Hotelo, plej alta siatempe, nun aspektas tute ordinara sur Chang'an-strato.




Promenejo kun belaj floroj

Je la ŝanĝiĝo de Pekino rimarkinda estas la granda progreso de la urbo-konstruado, kvankam la senĉesaj vojkonstruado ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de veturado de aŭtoj, kies nombro kreskas ĉiujare je almenaŭ ducent mil. La novaj vojoj malfermitaj je la 50-jara jubileo tamen portempe mildigis la trafikan streĉecon.

Antaŭ 20 jaroj mi ne imagis al mi, ke tiel multe ŝanĝiĝis Ĉinio, kaj ankaŭ nun estas malfacile imagi kia estos Ĉinio post pliaj 20 jaroj. Tamen kiel diplomato mi rimarkas la grandan atenton de Ĉinio al la amikaj rilatoj kun aliaj landoj. Kredeble tiu ne ŝanĝiĝos, ĉar Ĉinio bezonas pacan medion por sia ekonomia evoluo kaj prosperiĝo. ■





Festa vespero sur la placo Tian'anmen



Dancantaj ulguroj



Ĉarmaj artfajraĵoj



Dancantaj nacimallpimultanoj

Grandioza festado

Baofeng-lago

de PANG NAIYING

GRIMPANTE, ni levis la kapon kaj rigardis supren: nur kelkaj rokoj reliefe pendis kaj la pinto estis nevidebla; kaj ni rigardis malsupren: rokego malantaŭ ni kvazaŭ abrupte krevis, tuj aperis longa kaj profunda fendo, kaj malvarma vento fajfis ĉe la nevidebla fundo, el kiu de tempo al tempo blanka vaporo elŝvebis. La ŝtona vojo sub niaj piedoj startis ĝuste de la fundo al la pinto kaj etendiĝis sur la deklivo. Ĉiĉerono diris, ke la vojo ne estas kruta, kompare kun la monto malproksima, kiun oni nomas “Nesto de Akcipitro”, ĉar la monto estas tiel kruta ke estas malfacile supreniri sur la vertikala ŝtona vojo, kiu estas larĝa nur por unu homo kaj super kiu akcipitroj rondflugas. Antikve banditoj okupis la monton kaj nun sur ĝi ankoraŭ staras antikva templo, kie oni litanias.

Kiam ni atingis la pinton, ni-ajn okulojn tuj frapis smeralda lago. La ĉiĉerono diris, ke la lago nomiĝas Baofeng, la plej bela en la fama ĉina arbara parko Zhangjiajie.

La kvieta lago aspektas kiel kristalo inkrustita en la monto: la akvo kaj la ĉielo kunfandiĝis, kvazaŭ birdoj flugus en la akvo kaj fiŝoj naĝus sur la ĉielo, ankaŭ turistoj volas aliĝi, sed kiam ili eksciis la profundecon de la lago — 72 m, egalan al tiu de la fendo menciita supre, ili nur suspiris.

Ni fine venis en la “bildon” per ŝipo. Venteto alportis aromon de floroj, ni ebriiĝis de la aromo kaj eĉ ne estis klara: ĉu la monto en la lago aŭ la lago en la monto?



Oni diris, ke printempe la monto fariĝas flormonto, kaj la lago — florldago; aŭtune sovaĝaj fruktoj pendas sur branĉoj kaj ruĝaj folioj ruĝigas la monton; kaj vintre verdas pinoj kaj disvolviĝas floroj de umearboj, sovaĝaj kamelioj kaj rododendroj, kiuj estas honoritaj kiel “feoj de floroj”.

Estas kviete, ke aŭdiĝis nur lirlado de fontakvo kaj intermite kantado de birdoj. Malproksime makakoj kaj grimpis kaj saltis, postkurante unu alian. Ili estas la plej gajaj bestoj en la arbaro. Ili kutime amase kolektas sovaĝajn fruktojn aŭ kelkope ŝtelas maizon en kampoj. Se ili renkontas homojn, ili tuj grimacas kaj diskuras fajfante, malsame kiel simioj de Emei-monto de Sichuan-provinco, kiuj vivtenas sin per “pirabado”. En Emei, kiam oni renkontas simiojn, oni ofte donas al ili manĝaĵojn. Iom post iom simioj grasiĝas kaj emas kuŝi. Ili ne plu estas vigle moviĝemaj kaj atendas turistojn ĉe arbaro. Se oni ne donas al ili manĝaĵojn, ili rabas ilian sakon kaj serĉas en ĝi manĝaĵojn. Se ne tro-

vinte, ili forĵetas ĝin al la montpiedo... Tiuj makakoj de Zhangjiajie ankoraŭ konservas sian sovaĝecon kaj serĉas manĝaĵojn en arbaro. La ĉiĉerono rakontis, ke iu lokano studanta pri makakoj 30 jarojn scipovas ilian ululadon. Se li estas tie kaj faras ululadon, makakoj tuj kolektiĝas ĉirkaŭ li, kaj iuj kuraĝaj saltas sur ŝipon, sed ĝentile.

Dum la rakontado iom post iom aŭdiĝis dolĉa kanto. Aŭskultante la kanton ni konjektis, ke la kantantino estas bela kiel ŝia kanto. Kiam nia ŝipo renkontis la ŝian, la knabino en ruĝaj tuĝja-aj vestoj elkajutiĝis, kun okuloj radiantaj, dentoj blankaj kaj vangoj ruĝaj. Vere la bela kanto prezentas la homon. Ni raviĝis de ŝia kanto, kiu vekis en ni amon al la naturo, al la monto kaj al la lago... Ankaŭ ni ekkantis, kaj la kantado forpelis niajn lacon kaj ĉagrenon.

Ni deziris, ke ni povu en la ŝipo aŭskulti la kanton kaj spekti la lunon. Antaŭ ni prezentiĝis la bildo: lunlumo verŝiĝas en la kajuton, fiŝoj ludas, kantoj ŝvebas kaj en la kantoj makakoj endormiĝas. ■

Prikanti la Flavanan Riveron

Teksto de PANG BIAN

Fotoj de WANG YUE

FOTISTO Wang Yue estas trankvile promenanta ĉe bordo de la Flava Rivero.

Por fotado li estis ŝnurligita ĉe krutaĵo en Hukou de la Flava Rivero, antaŭ li la ondoj impete sin ĵetis kaj falis vertikale ĉe faŭlto. La akvofalo tondre bruis, levante neĝblankan nebulon. Li konis bone fortecon kaj spiriton de la rivero.

Elpreninte sian fotilon li interkomunikiĝis kun la rivero. Li decidis neniam forlasi ĝin.

LA ETERNA TEMO

En 12 jaroj Wang 26-foje vizitis Hukou, kiun li foje refoje fotis kaj prenis kiel temon de siaj verkoj. Li amas Hukou kaj tiu prezentis al li mirindajn pejzaĝojn nekonatajn de aliaj.

La 26-an de decembro 1988, li unuafoje vizitis Hukou. Estis frosta vintro. La rivero jam glaciĝis kaj ĉie estis diafana glacio. Kun larĝe malfermitaj okuloj li rigardis ĉirkaŭen kaj vidis plurajn glaciajn leonojn kaŭrantajn kun alte levita kapo.

Tiuj glaciaj leonoj estas majstroverko de la naturo — ondoj kaj neĝeroj senĉese falis sur la balustradojn de la krutaĵo kaj glaciĝis. Tagon post tago formiĝis la amindaj bestoj. Riskante sian vivon, Wang fotis la amindajn bestojn tuj ĉe la krutaĵo, ĉar la suno estis subiranta kaj ĝiaj radioj ŝanĝiĝemaj. Kiam li tuta tremante, forlasis la pejzaĝon, li trovis, ke liaj fotilo kaj vestoj jam malsekiĝis de glacio.

La glaciaj leonoj estas valora donacaĵo de Hukou al Wang Yue. Tia pejzaĝo ne ofte vidiĝas. Wang kaptis kaj eternigis ĝin en siaj fo-




toj. Li donis al la verko nomon “Leono majestas ĉe torento”.

Kiam li 26-a-foje vizitis Hukou, starante sur fundo de la krutaĵo li trovis, ke malaperis grandaj rokoj, sur kiuj li iam fotis la akvofalon. Pri tio li bedaŭris. Ĝuste tiam li trovis, ke super la akvofalo aperis strio da ĉielarko. Li emociiĝis: “Ho, la naturo, kiamaniere mi danku vin?”

LAŬ MELODIO DE LA FLAVA RIVERO

En sia juneco Wang Yue estis muzikisto, kaj li amis muzikon tiel forte, kiel li amas Hukou. La melodioj plej bone luditaj de li estas “Ĥoro la Flava Rivero”.

La aŭtoro de la teksto de “Ĥoro la Flava Rivero” ja estis inspirita de la akvofalo Hukou antaŭ 60 jaroj. Tiam la necedema ĉina popolo kuraĝe rezistis kontraŭ la malamiko. La imponco kaj ne-



1. Glaciaj leonoj
2. Akva "spegulo" sur roko ĉe Hukou
3. "Ĉeno" super la rivero
4. Akvofalo





venkebleco de la Flava Rivero forte inspiris lin kaj li verkis la tekston, kaj la kanto kuraĝigis la ĉinan popolon de multaj generacioj.

Wang Yue diris: “Mi fotis Hukou observante melodion de la ĥoro, kaj kiam mi staris tie, mian menson tuj lumigis ĝia melodio kaj mia penso asociiĝis kun la patrio, nacio kaj boatistoj batalantaj en la ŝtormo. Mi serĉis imponajn pejzaĝojn ĉe la akvofalo kaj konservis ilin en la fotoj. Kiam mi premis la momentan obturilon, mi sentis, ke mi kaptis la ritmon de la melodio.”

En tiuj tagoj, kiam li fotis en Hukou, li loĝis ĉe maljunulo, kiu rakontis multe pri Hukou: “Antaŭ 4 600 jaroj la Flava Rivero ne havis vojon ĉe Hukou. Ĝi do inundis vastajn kampojn kaj eĉ iujn montetojn. Da Yu en Hukou estis taskita batali kontraŭ la inundo. Li faris trairejon por la rivero, kaj poste li reguligis ankaŭ aliajn riverojn por ke ili ĉiuj sin direktu orienten al la maroj. Ja en Hukou li komencis siajn meritojn por la popolo.” La maljunulo diris fiere. De malproksime aŭdiĝis la torenta bruo, Wang Yue ekkantis “Prikantado de la Flava Rivero”. Li pensis, kion la nunaj homoj povas fari por la rivero.

Wang pripensis ĉiujn partojn de Hukou. Tie tutjare furiozis vento kaj sablo. Vizaĝe al la leŭso kaj flava akvo Wang ekmeditis pri medioprotekto zorgata de la tuta homaro. Tial li faris la foton nomatan “Hukou ombrata”. Li diris, ke tio estas lia deziro — verdigi Hukou.

POR MANIFESTI LA FLAVAN RIVERON

Antaŭ 49 jaroj Wang Yue naskiĝis en minista familio ĉe la Flava Rivero. Li heredis diligencon de sia patro, kiu laboris super karbo, sed li super spirito.



La geedzoj ĉe Hukou

Dum 12 jaroj li uzis pli ol 600 rulojn da filmoj. La akvofalo Hukou altas ĉ. 50 metrojn, ĉiujare okazis homa morto tie. La edzino de Wang Yue diris, ke ĉiu lia foriro al

la alian ekstremon de la ŝnuro surborde, dume la filo staris apude kun larĝe malfermitaj okuloj kaj atente observis ŝanĝiĝon de la fluo. Vintre, la rivero glaciigis, Wang ligis siajn ŝuojn per pajlo por eviti gliti.

Luj diris, ke la spirito de Wang Yue estas sama kiel tiu de Hukou — firmvole antaŭen. Ĝuste dank’ al tiu spirito li konis Hukou kaj la riveron. Ĉe la sojlo de la nova jarcento li prezentis al la mondo Hukou — la bildlibron kaj ekspozicion de la fotoj “Animo de Ĉinio — Hukou de la Flava Rivero”.

Antaŭ liaj verkoj oni sentas la imponecon, senbridecon de la Flava Rivero kaj senliman odoron de leŭso. En la



Fotado kun helpo de la filo

Hukou maltrankviligis la tutan familion kaj tial ŝi kaj la filo laŭeble akompanis Wang en la vojaĝo.

La fluo en Hukou estas kaprica. Kiam la rivero abrupte leviĝas, estas danĝere por la homoj ĉe la rivero. Tial kiam Wang Yue faris fotadon, li ĉiam ligis sin per ŝnuro ĉe la talio, kaj lia edzino firme tenis


fotoj Hukou kaj torentas tondre kaj kvietas gaze. Wang Yue ne nur prikantas la Flavan Riveron sed ankaŭ konigas sian volon. Prave diris iu filozofo: “Natura pejzaĝo interkomunikas kun animstato de homoj.” Wang Yue ricevis inspiron el Hukou kaj dum la verkado kunfandiĝis li kaj Hukou. ■



La poŝtmarka bildo pri la insigno de la 22-a Kongreso de UPU

La universala poŝtaŭto


中国 1999 世界集邮展览



Poŝtmarka bloko pri la Naŭdraka Muro por la 22-a Kongreso de UPU



Nigra penco emisiita de Britio



Sendentaj poŝtmarkoj kun bildo de drako emisiitaj de Ĉinio en 1878



第22届万
THE OPENING OF T



Memorigaj poŝtmarkoj por la 22-a Kongreso de UPU

KIAM mi estis knabino, mi miris, kial malgranda koverto kun poŝtmarko tra la aperturo de poŝtkesto povas viziti ĉiun lokon de la mondo. Mi demandis la patrino: "Kiel leteroj iras sian vojon? Por kio taŭgas poŝtmarko?" Kaj la patrino respondis: "Leteroj vizitas la mondon per poŝtaŭtoj, kaj poŝtmarko estas bileto por veturo." Poste mi iam atendis ĉe mia pordo poŝtaŭton portantan avizon de universitato. Mi ankaŭ komisiis al poŝtaŭtoj transdoni miajn salutojn, bondezirojn kaj amon al parencoj kaj amikoj malproksimaj... Poŝtaŭto eniris en mian vivon.

Septembre de 1999, kiam okazis en Pekino la 22-a Kongreso de la Universala Poŝta Unuiĝo (UPU), mi havis ŝancon pli bone koni la




mondan poŝton.

LA UNUA POŝTMARKO DE LA MONDO

La poŝtmarko nomata "nigra penko", estas la unua speco de

poŝtmarko emisiita en 1840. Antaŭ ĝia naskiĝo, pro diferenco de monunuoj de diversaj landoj, poŝtpagoj ne havis komunan normon. Post ĝia naskiĝo tia situacio finiĝis. Por administri la internacian

La unuataga koverto de la inaŭguro de la 22-a Kongreso de UPU



邮政联盟大会开幕

22ND UNIVERSAL POSTAL CONGRESS



邮政编码



La emisiotaj poŝtmarkoj multe plaĉaj al kongresanoj

poŝtan aferon, oni starigis en la 15-a de oktobro 1874 la Ĝeneralan Poŝtan Unuiĝon, kaj en majo 1878 ĝi ŝanĝis sian nomon en "Universala Poŝta Unuiĝo", kies stabo situas en Berno, ĉefurbo de Svislando. La nombro de ĝiaj membroj en 1998 atingis 189 kaj en la komenco estis nur 22.

GRANDA POŝTA RETO


La starigo de UPU kaj ĝiaj konvencioj rompis la barojn malhelpantajn la disvolviĝon de la internacia poŝta afero. Formiĝis internacia poŝta reto, kiu ne konas landlimon kaj en kiu 6.1 milionoj da laborantoj en 700 mil poŝtoficejoj traktas ĉiutage 400 miliardojn da leteroj kaj pakajfoj.

FESTOTAGO DE LA ĈINA POŝTO

Kiel gastiganto de la 22-a kongreso de UPU, ĉinoj varme bonvenigis la "poŝtaŭton" kun 2 000 reprezentantoj. Dum la 24 kongresaj tagoj, krom partopreni fakajn kunvenojn, ili ankaŭ diskutis pri strategia problemo kaj vizitis la ĵus finkonstruitan Poŝtan Muzeon. Iu reprezentanto el Kamboĝo diris: "Estas nekredible, ke la ĉina poŝta afero estas tiom prospera.



Kongresanoj el diversaj landoj



Kongresanoj vizitantaj la Poŝtmarkofaran Buroon de Ĉinio

Kvankam la poŝta afero de Ĉinio ne povas sin kompari kun tiu de evoluintaj landoj, tamen post 1914, kiam Ĉinio aliĝis al UPU, ĝi jam disvolviĝis en grandan poŝtan landon kun plej granda poŝta reto kaj plej multaj klientoj. En 1998 la totala longeco de ĝia poŝta vojo jam atingis 2.7 milionojn da kilometroj, kaj ĝi havas 84 000 poŝtoficejojn kun 1.14 milionoj da laborantoj.

La kongreso ankaŭ donis ŝancon al filatelistoj. En 7 eksponejoj ili povis spekti filatelaĵojn ĉinajn kaj alilandajn, kaj ĉe la vendotablo

homoj svarmis. Iu aliloka filatelino gluante poŝtmarkon diris, ke ŝi volas kolekti poŝtmarkojn de ĉiuj landoj ĉi tie troveblajn kaj stampi ilin por konservo.

Hodiaŭ jam fermiĝis la lasta kongreso en ĉi jarcento, nomata "perspektiva kongreso". Antaŭ defio de informa industrio, ĝi difinis novan celon "Poŝta Strategio de Pekino", en kiu reformoj kaj disvolvado plano prezentos oportuon al la publiko. La verda poŝtaŭto kun nova celo ekveturis al la nova esperoplena jarcento. ■

ĈINIO

● La 6-8-an de aŭgusto 1999 okazis en la urbo Anshan, Liaoning-provinco, la 2-a Nordorientregiona Kongreso de Esperanto kun 47 partoprenantoj. Ĝia temo estas "Plifortigu la interregionan kunlaboron kaj bonvenigu la novan jarcenton". Dum la kongreso esperantistoj el Liaoning prezentis E-dramon "Eksperimentoj" verkitan kaj reĝisoritan de Laŭlum. Ĝi rakontas, ke dank' al Esperanto, ĉinaj esperantistoj sukcesis en internacia kunlaborado. La kongreso raportis pri la loka E-movado, esperante, ke samideanoj de najbaraj landoj Rusio, Koreio, Japanio kaj Mongolio aktive kunlaboros kaj klopodos por okazigi la Nordorient-Azian Kongreson de Esperanto. (Wang Teng)

● Respektive en la 21-a kaj 23-a de aŭgusto 1999 la ĉina poŝ-



La 2-a Nordorientregiona Kongreso de Esperanto

la jam uzata monunuo "stelo". En 1960 estis faritaj moneroj de 1 stelo (el bronzo), 5 steloj (el latuno), 10 steloj (el kupronikelo) kaj en 1965 aldoniĝis la 25-stela monero el arĝento. Nun vi povas aĉeti ilin kiel memoraĵojn de grava parto

de nia historio. La Universala Ligo havas je dispono monerojn de 1 stelo kaj 25 steloj kaj ilia valoro estas 1,10 kaj 32,05 NLG respektive. Al tiu valoro aldonendas

la sendokosto NLG 5,00 kaj por eventuala registro pagendas kiel sendokosto NLG 11,50. Internacia Esperanto-Instituto, rete: <iei001@worldonline.nl>; adr.: Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

(IEI, Ret-info)

2000. Per ĉi tiu renkontiĝo la asocio celas bonvenigi esperantistojn de diversaj landoj sub la ombro de Himalajo. Ĝuante la belecon de naturo, oni povos diskuti pri la Esperanta movado kaj samtempe havi bonan ŝancon ekkoni la himalajan popolon kaj specife nepalajn esperantistojn. La programo estos taŭga al ĉiu aĝo kaj ambaŭ seksoj.

Bonvolu kontakti ĉe: 3-a I.H.R. 2000, G.P.O. Post Box No.: 10518, Kathmandu, Nepal; retroŝto: Sosierra@wink.com.np.

(Nepala Esperanto-Asocio)

RUSIO

● "75 jaroj" de William Auld eldoniĝis en junio 1999 en Rusio. 48 paĝoj + 8 fotopaĝoj. La vivo de Auld bildiĝas antaŭ ni: deveno kaj lernejoj de Bill; liaj hobiaj; flugarmeaservo en la 2-a Mondmilito; esperantistiĝo; vivo familia; amikoj kaj verkoj; pritakso de la nuna stato de Esperantujo. Krom la aŭtobiografio, la libro enhavas 17 fotojn, poezian antologieton kaj bibliografion. Ĝi estas mendebla ĉe la eldonejo Sezonoj poŝte (RU-620014 Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando) aŭ rete: <hrgo@sbank.e-burg.su>. La prezo: 4 eŭroj. Sendokosto fakturota. (Sezonoj)



La poŝtstampoj uzitaj de la Haikou-a Filatela Kompanio

to emisiis specialajn poŝtmarkoseriojn "Ĉinio '99 la monda filatela ekspozicio" kaj "La 22-a kongreso de UPU-Beijing 1999". La Haikou-a Filatela Kompanio uzis poŝtstampilojn kun vortoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto, desegnitajn de Zhang Linrui.

NEDERLANDO

● 1959 estis jubilea jaro de Esperanto. Kiel kontribuon al tia festado, Universala Ligo (UL) decidis aperigi metalan version de



NEPALO

● Nepala Esperanto-Asocio planas organizi la Trian Internacian Himalajan Renkontiĝon de la 26-a de februaro ĝis la 7-a de marto

Ili plektas amikan ligilon el voĉo



La personaro de E-sekcio de ĈRI

de LI PING

LA Esperanto-disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) travivis jam 35 jarojn. Komence ĝi okazis unu fojon semajne, nur al Orienta Eŭropo; nun kvar fojojn ĉiutage, respektive al Eŭropo, Orienta Azio, Sudorienta Azio kaj Latinameriko. Ĝi enviciĝis inter la fortaj E-radioj en la mondo per kovrita areo kaj disaŭdiga horo. Ĝiaj aŭskultantoj troviĝas en la kvin kontinentoj.

En la Esperanto-sekcio de ĈRI laboras kompetentaj esperantistoj. Ili amas la laboron kaj fidelas al la devo, kaj ĉiu el ili dediĉis sian tutan junecon al la afero. Iu maljuna germana aŭskultanto tiel taksis ilian laboron: "Sukcesoplena estas via senlaca laboro, kiu plektas amikajn ligilojn kaj firme kunligas vian

grandan kaj gloran landon kun aliaj landoj."

La 19-an de decembro 1964, en la firmamento eksonis voĉo de ĉinaj esperantistoj — "Parolas Pekino!", la signalo de la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino (nun ĈRI), tuj entuziasme eĥis diverslandaj esperantistoj. Varmaj leteroj flugis de diversaj lokoj de la mondo al Pekino.

La iniciatintoj de la ĉina Esperanto-disaŭdigo tiam estis junaj. Por la disaŭdigo ili forlasis sian amatan fakon kaj kune komencis la novan karieron. De la pasintaj 35 jaroj ili eksplikas vidpunktojn de la ĉina registaro pri gravaj eventoj, raportas grandajn atingojn de Ĉinio en la moderniga konstruado, precipe la grandegajn ŝanĝiĝojn ekde la reformado kaj pordomalfermo, konigas pri la longa historio, brila kulturo, riĉa literaturo kaj

arto, diversaj moroj kaj kutimoj de Ĉinio kaj aliaj aspektoj interesantaj diverslandajn aŭskultantojn. Ili raportas ankaŭ la historion kaj nunan staton de la Esperanto-movado de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj amikan interŝanĝon de diverslandaj samideanoj.

De la pasintaj 35 jaroj ilia voĉo ĉiam akompanas diverslandajn aŭskultantojn. Multaj aŭskultantoj rigardas ilian disaŭdigon kiel fenestron por koni Ĉinion kaj rimedon por akceli la amikecon inter la ĉina popolo kaj aliaj popoloj. En sia artikolo iu germana aŭskultanto skribis: "Mi ĉiam fidele kaj plezure aŭskultas vian disaŭdigon, kio estas ne nur mia spirita ĝuo, sed ankaŭ grava kurso por lerni la ĉinan historion. Via disaŭdigo ege riĉigis mian scion, tiel ke mi ekhavas la fortan deziron: nepre vojaĝi al via lando kaj amikiĝi kun la diligenta, brava kaj honesta ĉina popolo." Tiu aŭskultanto partoprenis en la 71-a UK okazinta en Pekino en 1986 kaj finfine realigis sian deziron.

Nemalmultaj el la aŭskultantoj havas specialan radio-aparaton, kies montrilo estas fiksita ĉe la frekvenco de la ĉina Esperanto-disaŭdigo. Iu belga aŭskultanto diris en sia letero: "Delonge mi ja estas aŭskultanto de Ĉina Radio Internacia. Preskaŭ ĉiuvespere, je la sama horo, mi sidas ĉe radio-aparato por aŭskulti vian programon. Dank' al tio mi pli proksimiĝas al Ĉinio kaj la ĉina kulturo." Iu japana amiko esprimis en sia verko, ke li ĉiam staros kune kun la Esperanto-sekcio de ĈRI.

La Esperanto-disaŭdigo de ĈRI ankaŭ akompanis maturiĝon de iuj junuloj.

Ekzemple tiu japana junulo aŭskultas la ĉinan Esperanto-disaŭdigon ekde 1965, kiam Ĉinio komencis la disaŭdigon al Japanio. Tuj post kiam Ĉinio malfermis la pordon al Japanio, li sekvis iun delegacion al Ĉinio kaj havis multajn travivaĵojn en Ĉinio. En aprilo 1979 li invitite faris oficialan viziton al

la Esperanto-sekcio de ĈRI. Havante profundan amikecon kun la sekcianoj, li donis multajn helpojn kaj subtenojn al ili. Tiam li estis juna fraŭlo. Poste li edziĝis kaj fariĝis patro de du filoj, sed li ankoraŭ tenas kontaktadon kun la ĉinaj amikoj malgraŭ peniga laboro por vivtenado de la familio. Nun liaj filoj plenkreskis kaj havas sian propran familion, sed tiu amikeco neniom kadukiĝis. Ĉiujare li alsendis festajn bondezirojn. De tempo al tempo li petas sian amikon, kiu vojaĝas al Ĉinio, transkomuniki varman saluton al la sekcianoj.

Iu itala junulo estas amika al la ĉina Esperanto-disaŭdigo ekde la infaneco. Li tiel elverŝis sian koron: "En 1974, kiam mi estis 9-jara knabo, mi jam komencis aŭskulti vian disaŭdigon kaj skribi al vi por raporti la aŭskultadon helpe de la patro. Dank' al Esperanto, mi povas koni la historion, geografion, arton kaj vivon de via bela lando, precipe la senlaca klopodado de via registaro kaj popolo en la procezo por prospero kaj paco. Mi konis ankaŭ la grandajn sukcesojn de via popolo ĝis nun. Mi admiras precipe vian senlaca klopodado por popularigi Esperanton en Ĉinio, kaj plie en la tuta mondo pere de via disaŭdigo."

ĈRI estas ŝtata radio, kiu sin disaŭdigas al la tuta mondo en 43 lingvoj. La Esperanto-sekcio estas malgranda en la radio. Tamen pri ĝia rolo aŭskultantoj donis trafan takson. Iu brita aŭskultanto, ankaŭ aktivulo de Esperanto-movado, tiel esprimis sian opinion antaŭ 5 jaroj, kiam la sekcio celebris sian 30-

jariĝon: "La 30 jaroj de la ĉina Esperanto-disaŭdigo estas klara kaj grava marko en la Esperanta historio de la tuta terglobo. La disaŭdigo ne mankigeblas por efektive konigi la vidpunktojn de Ĉinio al diversaj landoj de la mondo. Malgraŭ ke Ĉina Radio Internacia havas 43 lingvojn, la Esperanto-disaŭdigo okupas apartan lokon, ĉar la Esperanto-disaŭdigo povas kovri iujn malgrandajn landojn, en kiuj multaj homoj ĝenerale ne povoscias la etnajn lingvojn uzatajn de via radio."

Laborantoj de la Esperanto-sekcio iris propran vojon, kian neniu antaŭe prenis. En esplorado ili iras antaŭen. Ili senĉese lernas, senĉese

strebas kaj stariĝas sian figuron inter ĉiuj Esperanto-radioj, kion aŭtoritatuloj laŭdis.

Iama prezidanto de UEA, usona profesoro H u m p h r e y Tonkin laŭdis en sia disertacio pri Esperanto-disaŭdigo, ke la fonetika kvalito de pekina radio estas bona kaj meritas esti modelo de Esperanto-disaŭdigo de la tuta mondo.

Iama ĝenerala sekretario de UEA, hungara doktorino Flóra Szabó-Felső diris en iu prelego, ke la Esperanto-disaŭdigo de Pekino faris gravan kontribuon por diskonigi informojn pri Ĉinio, por propagandi la ĉinan kulturon, kaj plie, por apliki Esperanton al ĵurnalisma fako. Cetere, la programo de ĈRI fariĝis lerno-materialoj de multaj aŭskultantoj.


La Esperanto-disaŭdigo de ĈRI



Intervjuo kun s-ro Chen Yuan, honora prezidanto de ĈEL, ĉe la 35-jariĝo de la ĉina E-disaŭdigo


estas ĉiam amata de diverslandaj aŭskultantoj. Iuj el ili eĉ organizis aŭskultan grupon aŭ klubon, en kiu ili faris multajn laborojn por interligi aŭskultantojn. Multaj aŭskultantoj prenis aliajn rimedojn, ekzemple surbendigi la programojn, okazigi ekspozicion, alglui afiŝon por varbi pli multajn aŭskultantojn por la radio. Ankoraŭ pli multaj aŭskultantoj afable sendis gazeton, ĵurnalon, libron, diktafonon, kasedon kaj diskon por riĉigi la disaŭdigon. Aparte neforgesebla estas paro da japanaj gesamideanoj, kiuj rigardas kontribuon al Esperanto-disaŭdigo kiel sian devon. Multfoje dum la japana Esperanto-kongreso ili kunsidigis aŭskultantojn de ĈRI por interŝanĝi spertojn kaj peti opiniojn. Poste ili detale raportis al la Esperanto-sekcio de ĈRI, por ke ĝi perfektigu sian laboron. Kiam la sinjorino bedaŭrinde forpasis, la sinjoro daŭrigas ŝian aferon, farante ĉion por la disaŭdigo kaj interfluo de ĉinaj kaj japanaj samideanoj.

La Esperanto-sekcio de ĈRI estas laŭdata ankaŭ de la estraro kaj kolegoj de la radio pro sia elstara laboro. Ĝi estas honorita plurfoje kiel avangarda sekcio kaj ĝiaj programoj multfoje gajnis premion. Tamen en ĝia oficejo oni ne vidas la honorajn diplomojn. Laŭ la sekcianoj, la honoro montras nur ilian pasintan sukceson, pli gravas plenforta klopodado por pli bela estonteco.



Vortoj skribitaj de Chen Yuan por E-disaŭdigo

Ili plektas amikan ligilon el voĉo



La personaro de E-sekcio de ĈRI

de LI PING

LA Esperanto-disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) travivis jam 35 jarojn. Komence ĝi okazis unu fojon semajne, nur al Orienta Eŭropo; nun kvar fojojn ĉiutage, respektive al Eŭropo, Orienta Azio, Sudorienta Azio kaj Latinameriko. Ĝi enviciĝis inter la fortaj E-radioj en la mondo per kovrita areo kaj disaŭdiga horo. Ĝiaj aŭskultantoj troviĝas en la kvin kontinentoj.

En la Esperanto-sekcio de ĈRI laboras kompetentaj esperantistoj. Ili amas la laboron kaj fidelas al la devo, kaj ĉiu el ili dediĉis sian tutan junecon al la afero. Iu maljuna germana aŭskultanto tiel taksis ilian laboron: "Sukcesoplena estas via senlaca laboro, kiu plektas amikajn ligilojn kaj firme kunligas vian

grandan kaj gloran landon kun aliaj landoj."

La 19-an de decembro 1964, en la firmamento eksonis voĉo de ĉinaj esperantistoj — "Parolas Pekino!", la signalo de la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino (nun ĈRI), tuj entuziasme eĥis diverslandaj esperantistoj. Varmaj leteroj flugis de diversaj lokoj de la mondo al Pekino.

La iniciatintoj de la ĉina Esperanto-disaŭdigo tiam estis junaj. Por la disaŭdigo ili forlasis sian amatan fakon kaj kune komencis la novan karieron. De la pasintaj 35 jaroj ili eksplikas vidpunktojn de la ĉina registaro pri gravaj eventoj, raportas grandajn atingojn de Ĉinio en la moderniga konstruado, precipe la grandegajn ŝanĝigojn ekde la reformado kaj pordomalfermo, konigas pri la longa historio, brila kulturo, riĉa literaturo kaj

arto, diversaj moroj kaj kutimoj de Ĉinio kaj aliaj aspektoj interesantaj diverslandajn aŭskultantojn. Ili raportas ankaŭ la historion kaj nunan staton de la Esperanto-movado de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj amikan interŝanĝon de diverslandaj samideanoj.

De la pasintaj 35 jaroj ilia voĉo ĉiam akompanas diverslandajn aŭskultantojn. Multaj aŭskultantoj rigardas ilian disaŭdigon kiel fenestron por koni Ĉinion kaj rimedon por akceli la amikecon inter la ĉina popolo kaj aliaj popoloj. En sia artikolo iu germana aŭskultanto skribis: "Mi ĉiam fidele kaj plezure aŭskultas vian disaŭdigon, kio estas ne nur mia spirita ĝuo, sed ankaŭ grava kurso por lerni la ĉinan historion. Via disaŭdigo ege riĉigis mian scion, tiel ke mi ekhavas la fortan deziron: nepre vojaĝi al via lando kaj amikiĝi kun la diligenta, brava kaj honesta ĉina popolo." Tiu aŭskultanto partoprenis en la 71-a UK okazinta en Pekino en 1986 kaj finfine realigis sian deziron.

Nemalmultaj el la aŭskultantoj havas specialan radio-aparaton, kies montrilo estas fiksita ĉe la frekvenco de la ĉina Esperanto-disaŭdigo. Iu belga aŭskultanto diris en sia letero: "Delonge mi ja estas aŭskultanto de Ĉina Radio Internacia. Preskaŭ ĉiuvespere, je la sama horo, mi sidas ĉe radio-aparato por aŭskulti vian programon. Dank' al tio mi pli proksimiĝas al Ĉinio kaj la ĉina kulturo." Iu japana amiko esprimis en sia verko, ke li ĉiam staros kune kun la Esperanto-sekcio de ĈRI.

La Esperanto-disaŭdigo de ĈRI ankaŭ akompanis maturiĝon de iuj junuloj.

Ekzemple tiu japana junulo aŭskultas la ĉinan Esperanto-disaŭdigon ekde 1965, kiam Ĉinio komencis la disaŭdigon al Japanio. Tuj post kiam Ĉinio malfermis la pordon al Japanio, li sekvis iun delegacion al Ĉinio kaj havis multajn travivaĵojn en Ĉinio. En aprilo 1979 li invitive faris oficialan viziton al

la Esperanto-sekcio de ĈRI. Havante profundan amikecon kun la sekcianoj, li donis multajn helpojn kaj subtenojn al ili. Tiam li estis juna fraŭlo. Poste li edziĝis kaj fariĝis patro de du filoj, sed li ankoraŭ tenas kontaktadon kun la ĉinaj amikoj malgraŭ peniga laboro por vivtenado de la familio. Nun liaj filoj plenkreskis kaj havas sian propran familion, sed tiu amikeco neniom kadukiĝis. Ĉiujare li alsendis festajn bondezirojn. De tempo al tempo li petas sian amikon, kiu vojaĝas al Ĉinio, transkomuniki varman saluton al la sekcianoj.

Iu itala junulo estas amika al la ĉina Esperanto-disaŭdigo ekde la infaneco. Li tiel elverŝis sian koron: "En 1974, kiam mi estis 9-jara knabo, mi jam komencis aŭskulti vian disaŭdigon kaj skribi al vi por raporti la aŭskultadon helpe de la patro. Dank' al Esperanto, mi povas koni la historion, geografion, arton kaj vivon de via bela lando, precipe la senlaca klopodado de via registaro kaj popolo en la procezo por prospero kaj paco. Mi konis ankaŭ la grandajn sukcesojn de via popolo ĝis nun. Mi admiras precipe vian senlaca klopodado por popularigi Esperanton en Ĉinio, kaj plie en la tuta mondo pere de via disaŭdigo."

ĈRI estas ŝtata radio, kiu sin disaŭdigas al la tuta mondo en 43 lingvoj. La Esperanto-sekcio estas malgranda en la radio. Tamen pri ĝia rolo aŭskultantoj donis trafan takson. Iu brita aŭskultanto, ankaŭ aktivulo de Esperanto-movado, tiel esprimis sian opinion antaŭ 5 jaroj, kiam la sekcio celebris sian 30-

jariĝon: "La 30 jaroj de la ĉina Esperanto-disaŭdigo estas klara kaj grava marko en la Esperanta historio de la tuta terglobo. La disaŭdigo ne mankiĝas por efektive konigi la vidpunktojn de Ĉinio al diversaj landoj de la mondo. Malgraŭ ke Ĉina Radio Internacia havas 43 lingvojn, la Esperanto-disaŭdigo okupas apartan lokon, ĉar la Esperanto-disaŭdigo povas kovri iujn malgrandajn landojn, en kiuj multaj homoj ĝenerale ne povoscias la etnajn lingvojn uzatajn de via radio."

Laborantoj de la Esperanto-sekcio iris propran vojon, kian neniu antaŭe prenis. En esplorado ili iras antaŭen. Ili senĉese lernas, senĉese

strebas kaj stariĝas sian figuron inter ĉiuj Esperanto-radioj, kion aŭtoritatoj laŭdis.

Iama prezidento de UEA, usona profesoro Humphrey Tonkin laŭdis en sia disertacio pri Esperanto-disaŭdigo, ke la fonetika kvalito de pekina radio estas bona kaj meritas esti modelo de Esperanto-disaŭdigo de la tuta mondo.

Iama ĝenerala sekretario de UEA, hungara doktorino Flóra Szabó-Felső diris en iu prelego, ke la Esperanto-disaŭdigo de Pekino faris gravan kontribuon por diskonigi informojn pri Ĉinio, por propagandi la ĉinan kulturon, kaj plie, por apliki Esperanton al ĵurnalisma fako. Cetere, la programo de ĈRI fariĝis lerno-materialoj de multaj aŭskultantoj.


La Esperanto-disaŭdigo de ĈRI



Intervjuo kun s-ro Chen Yuan, honora prezidento de ĈEL, ĉe la 35-jariĝo de la ĉina E-disaŭdigo

estas ĉiam amata de diverslandaj aŭskultantoj. Iuj el ili eĉ organizis aŭskultan grupon aŭ klubon, en kiu ili faris multajn laborojn por interligi aŭskultantojn. Multaj aŭskultantoj prenis aliajn rimedojn, ekzemple surbendigi la programojn, okazigi ekspozicion, alglui afiŝon por varbi pli multajn aŭskultantojn por la radio. Ankoraŭ pli multaj aŭskultantoj afable sendis gazeton, ĵurnalon, libron, diktafonon, kasedon kaj diskon por riĉigi la disaŭdigon. Aparte neforgesebla estas paro da japanaj gesamideanoj, kiuj rigardas kontribuon al Esperanto-disaŭdigo kiel sian devon. Multfoje dum la japana Esperanto-kongreso ili kunsidigis aŭskultantojn de ĈRI por interŝanĝi spertojn kaj peti opiniojn. Poste ili detale raportis al la Esperanto-sekcio de ĈRI, por ke ĝi perfektigu sian laboron. Kiam la sinjorino bedaŭrinde forpasis, la sinjoro daŭrigas ŝian aferon, farante ĉion por la disaŭdigo kaj interfluo de ĉinaj kaj japanaj samideanoj.

La Esperanto-sekcio de ĈRI estas laŭdata ankaŭ de la estraro kaj kolegoj de la radio pro sia elstara laboro. Ĝi estas honorita plurfoje kiel avangarda sekcio kaj ĝiaj programoj multfoje gajnis premion. Tamen en ĝia oficejo oni ne vidas la honorajn diplomojn. Laŭ la sekcianoj, la honoro montras nur ilian pasintan sukceson, pli gravas plenforta klopodado por pli bela estonteco.



Vortoj skribitaj de Chen Yuan por E-disaŭdigo

TRANS LA MARO

Chen Liqun estas juna esperantistino, kiu antaŭe loĝis en suda Ĉinio. En 1995 ŝi komencis novan vivon en Eŭropo kaj estas konata de la e-istoj kiel Lidia Chen. Ŝia libro "Trans la maro..." priskribas ŝian travivaĵon en Eŭropo, ekz. la malsameco de kutimoj, kulturoj kaj konceptoj, kaj ankaŭ la famileco de Esperantujo. Leginte ŝian libron, mi estas kortuŝita de ŝiaj delikata sento kaj subtila plumo. Tial mi tre volonte rekomendas pecojn el ŝia libro al niaj karaj legantoj. Mi konatiĝis kun ŝia edzo Bernhard Westerhoff antaŭ 5 jaroj kaj kelkfoje renkontiĝis kun ili. En oktobro, kiam ĉiuj ĉinoj festis la 50-an datrevenon de fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, mi ĝoje revidis ilin kaj ilian 9-monatan filon en Pekino. Feliĉon kaj ĉion bonan mi deziras al la internacia familio de Chen kaj Bernhard.

Yu Tao

de CHEN LIQUN

LA SOMERO EN PRAGO

En 1996 mi fariĝis individua membro de UEA kaj unuafoje partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto.

La 81-a UK okazis julie en kongreso-centro de Prago, ĉefurbo de Ĉeĥio. Ĉe la akceptejo mi vidis lokajn e-istojn diligente laborantajn. Sur la kongresa libro mi legis la nomon de Bakin, fama ĉina verkisto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

"Ĉu Bakin venis? Ĉu mi vidos lin?" mi demandis aliajn.

Mi ricevis nean respondon. Mi konis multajn verkojn de Bakin, ne nur ĉinajn, sed ankaŭ Esperantajn. Mi tre bedaŭris, ke pro malsano kaj granda aĝo li ne povis veni al la kongreso.

Tamen mi tre ĝojis vidi samideanojn el Ĉinio. S-ino Tan Xiuzhu,

prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) afable demandis pri mia vivo en Eŭropo. En la solena inaŭguro, reprezentante ĈEL, ŝi anoncis, ke la Unua Azia Kongreso de Esperanto okazos en Ŝanhajo en aŭgusto kaj Ĉinio invitas la tutan

Foje ni sep-kape kune manĝis en ĉina restoracio. Juna servisto el Ĉinio demandis min: "Verŝajne vi parolas ne la anglan lingvon, el kiuj landoj vi venis, kiun lingvon vi uzas?"

"Ni venis el sep landoj, Ĉinio, Germanio, Hungario, Francio, Bulgario, Ganao kaj Britio. Ni parolas Esperanton, la internacian helpantan lingvon. Nun en Prago okazas la Universal Kongreso de Esperanto," mi klarigis al li.

"Ja mirinda lingvo, sen ĝi vi el diversaj landoj tute ne povus interkompreniĝi," la ĉina servisto admiris.

En Prago mi ĝuis la familian vivon en Esperantujo. Neforgesebla, la somero en Prago!



La aŭtoro (meze) kaj s-ino Tan Xiuzhu (maldekstre) en Prago

mondon.

Dum la kongreso ĉinaj esperantistoj diskonigis librojn, okazigis kunsidon de legantoj — ili montris la aktivecon de la ĉina movado.

MANĜI EN EŬROPO

Antaŭ mia foriro el Ĉinio miaj kolegoj diris: "Vi ĝuos la feliĉon en aliaj landoj, manĝos bovon kaj panon." Sed fakte mi ne povis "ĝui"

la eŭropajn manĝaĵojn.

Mia unua tasko en Eŭropo estas “lerni” manĝi panon. La bona pano de Eŭropo estas malmola kaj nigra, tute malsama al la ĉina. Antaŭ la peza nigra pano mi ne scias kion fari. Mi eĉ ne kapablas tranĉi ĝin. Neniel mi povas ŝati ĝin. Sed multaj eŭropanoj tute ne ŝatas blankan panon.

Fakte ĉinoj havas longan historion pri manĝo de rizo, sed dum miaj unuaj tagoj en Eŭropo manĝi rizon estis tre luksa postulo. Feliĉe, Frankfurt estas internacia urbo, kie troviĝas restoracioj ĉina, itala, tajlanda, vjetnama, korea, hinda, greka ktp. Foje, kun amiko mi vizitis restoracion kun ŝildo “Kantono” — mia hejmloko. Mi gaje mendis ĉe servisto du tipajn kantonajn pladojn. Ekster mia atendo, li diris: “Ni ne havas.”

“Ĉu via restoracio ne estas tiu de Kantono?” mi ekdubis pri miaj okuloj.

“Jes, ĝi estas.”

“Sed kial vi ne havas tipajn kantonajn pladojn?”

“La mastro venis de Ŝanhajo.”

Jen la vero.

Foje, iu svisa amiko demandis min: “Kion vi plej bezonas en Eŭropo?” “Ĉinajn manĝaĵojn!” mi respondis senhezite. En Eŭropo mi ofte manĝas tion, kion mi ne bone konas. Kaj kiam aliaj demandis min: “Ĉu estas bongusta?” Mi ofte ne scias kion diri. Mi interesiĝis pri kuirado kaj eĉ elektis postenon pri manĝaĵoj.

MIA UNUA POSTENO

Post 9-monata lernado en lingva lernejo de Germanio, mi finis la elementan kurson. Mi eniris filion de la Svisa Flugkompanio. Mi transformiĝis el laborantino de ŝtata fabriko de socialisma lando en oficistinon de alilanda kapitalisma kompanio.

La kompanio estas G. Mi estis ŝarĝita per 6-monata prova servo. Mia tasko estas fari manĝaĵon por aviada kompanio. En Ĉinio mi neniam faris tian laboron. En la unua



La edzo de la aŭtoro (la kvara de dekstre) kaj diverslandaj samideanoj en UK

tago mi estis metita en la fakon “Unua Klaso”, kie oni faras manĝaĵon kaj etmanĝaĵojn. Iu sinjoro ordonis al mi: “Prenu 20 mangojn el la frida kamero.” Mi tuj elektis la plej bonajn kaj grandajn. Sed li forĵetis unu post alia. Li klarigis al mi: “Ĝi estas tro matura kaj malmola.” Ĉar li devus senĉeligi kaj tranĉi ĝin en pecetojn. Se la mango estas tre matura, ĝi ne povas iĝi kuba formo. Mi prenis mangon pensante, ĉu forĵeti ĝin aŭ ne. “Forĵetu ĝin.” Mi ne havis alian elekton. Ĉar se mi ne forĵetus ĝin, li farus tion. Malŝparemo, jen mia unua impresio pri la kompanio G.

En mezlernejo mia lernolibro diras, ke kapitalisto forĵetas freŝan lakton, anstataŭ donaci ĝin al malriĉuloj. En G mi propraokule vidis, ke oni forĵetas tre luksan manĝaĵon, sed la oficistoj ne rajtas manĝi.

Mia peniga laboro en G komenciĝis tuj post eliro el la trajno: mi devis kuri al la kompanio kaj surporti la laborajn vestojn kaj ŝuojn — en unu aŭ du minutoj. Mi havis nur 15 minutojn por matenmanĝi. Kiam mi ankoraŭ ne finis du pangojn, jam estis tempo por eklabori. Ĉiutage mi devis kuri al kaj el la frida kamero pli ol cent fojojn. Ĉe la fino de laborhorro ni devis purigi

